# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 11 Novembro, 2013

*Kara Leganto, en ĉi Novembra n-ro ni informas vin pri gravaj venontaj eventoj en la vivo de nia E-kolektivo. Vi preskaŭ divenis, ke temas pri celebrado de la Zamenhofa Tago + informo pri la E-konferenco en Kolomeo (Ukrainio), kiun partoprenis kaj kie prelegis (!) du membroj de ESdŜ: prez. d-ro Leszek Kordylewski kaj redaktoro Viktoro. Gravas, ke dum la konferenco estis prezentita vere unika libro: "Verda Antologio" (antologio de E-poezio en la ukraina lingvo, eldonon de kiu subtenis la ESdŜ).*

*Baldaŭ okazos reelekta kunsido: por partopreni balotadon, por esti elektita vi DEVAS esti membro de la E-societo. Ne forgesu pagi membro-kotizon, kio estas unu el kondiĉoj de la membreco. S-no G. Dolgin proponis sian liston de estraranoj (vi povas subteni ĝin aŭ sendi al la redakcio viajn proponojn): Les Kordylewski (prezidanto); Andreo Kolganov (vic-prezidanto); Tina Seastrom (sekretario); Charles Gunn (kasisto). Posteno de prezidinto estas aŭtomata.*

*Pri la aliaj novaĵoj, proponoj ktp. bv legi malsupre. Dankon pro la atento!* –La Redakcio




## Eventoj

**1.** Zamenhofa Tago kaj Bankedo okazos la 15an de Decembro, inter tagmezo kaj 4 ptm, sur la 24a etaĝo de MDA City Apartments laŭ adreso: 63 E. Lake St., Chicago. Partopren-kotizo – ne pli ol $20. Bv sendi anticipan pago-ĉekon je $10 al Viktor Payuk. Pro la sekurec-reĝimo (oni devas prezenti liston de partoprenontoj al sekurec-kompanio) bv konfirmi vian partoprenon rete (vpayuk@yahoo.com), telefone: (773) 344-2276, poŝte (vd adreson sur p. 2).



**2.** La Esperanto-Klubo de Orient-Centra Ilinojo, kaj la Esperanto-Klubo de la Universitato de Ilinojso invitas la grupanojn de la Esperanto-Societo de Ŝikago al nia Zamenhof-festo. Ĝi okazos sabaton, la 14an decembro, en la enirejo de Krannert Center for the Performing Arts (en la universitato de Ilinojso) je 12:00 laŭ adreso estas: 500 S. Goodwin Ave, Urbana, Ilinojso. Jen la paĝo "trovu ni" por la centro (en la angla): http://www.krannertcenter.com/findus.aspx

Ni servos picon – bonvolu sciigi (antaŭ la 7an de decembro) al Dan Gierl info@ekoci.org aŭ telefone (217) 460-0592 pri via plano ĉeesti, por ke ni havu sufiĉon da...

**3.** EsperantoKulturDomo en Grezilono (Francio) proponas grandan eventaron jarfine, vintre, printempe. Vizitu retejon: gresillon.org/agendo.

## Kunlaboru kun ESF!

ESF strebas informi la Esperanto-komunumon pri nia laboro kaj inviti esperantistojn kunlabori. Tiu ĉi letero estas plia paŝo al tiu direkto. ESF-laboro okazas grandparte ekster la kutimaj limoj de Esperanto-movado. Unu ekzemplo estas niaj streboj influi la akademian komunumon kaj formi la publikan opinion pri lingvoj kaj lingva egaleco. Kelkaj el niaj projektoj, tamen, havas rektan ligon al Esperanto kaj donas praktikan valoron al la komunumo de Esperanto-parolantoj, ekzemple:

Lernu.net. Multe pli ol Esperanta retlernejo, lernu! estas komunumo de pli ol 150 mil registritaj uzantoj el 200 landoj. Ĉi-aŭguste ĝi ricevis la Premion Deguĉi de UEA pro ĝiaj kontribuoj al interkultura interkompreniĝo tutmonde.

Edukado.net. Riĉa je rimedoj por instruistoj kaj kun komunumo de pli ol 3000 Esperanto-instruistoj kaj lernantoj, Edukado.net estas envio de multaj pli grandaj lingvolernaj retejoj.

Tekstaro.com. La korpuso de pli ol kvar milionoj da vortoj de skribita Esperanto, Tekstaro povas helpi al vi trovi, kiel certa vorto aŭ frazo estas uzata en Esperanta literaturo de la Zamenhofa tempo ĝis nun.

NASK (esperantic.org/eo/nask). La Nord-Amerika Somera Kursaro estas unu el la plej konataj ĉeestaj Esperanto-lernejoj en la mondo, kiu okazas ĉiujare ekde 1969 (vd. Saluton!, 2013,10).

Ni invitas vin, kiel aktivan subtenanton kaj parolanton de Esperanto: ☞

*Fariĝi regula* uzanto/lernanto/partoprenanto en tiuj projektoj;
*Diskonigi* la informojn pri ili en viaj grupoj kaj rete;
*Informiĝi* pri ESF-agado per aliĝo al nia novaĵservo ĉe esperantic.org;
*Reklami* viajn proprajn Esperanto-eventojn kaj renkontiĝojn per lernu! kaj Edukado;
*Volontuli* – ekzemple, kiel instruisto aŭ tradukisto de lernu.net, aŭ provizi materialojn kaj informojn por Edukado.net aŭ la Mediateko de Lernu.net.

Laste, sed ne malpli grave, mi invitas vin subteni ESF-on per viaj donacoj! Niaj pasintaj kaj nunaj donacantoj estas parto de la sukceso de ESF. Se vi ankoraŭ ne donacis al ESF, ni petas vin konsideri fari donacon ĉi-jare. Se vi jam donacis al ESF, ni petas vin konsideri fari monatan kontribuon. Vi povas donaci rete: esperantic.org/donacoj (unufoje aŭ ĉiumonate). Vi povas ankaŭ lasi heredaĵon per planita donacado (bv. kontakti Wally Du Temple, wally.du.temple@esperantic.org, 1-250-656-1767).

Elkoran dankon pro via intereso kaj subteno. Kune, ni laboru por antaŭenigo de Esperanto en nia evoluanta mondo.

Amike kaj dankeme, *Mark Fettes, Eliranta Prezidanto, ESF*

# Esperanta Literaturo

Karaj amikoj miaj, jam proksimiĝas sufiĉe grava E-evento – naskiĝtago de nia Majstro. Kvankam L. Zamenhof mem ĉiam akcentis, ke li estas ne kreinto, sed iniciatoro de la lingvo, ni ja devas memori, ke li mem ne nur verkis la lingvon, sed ankaŭ la movadon, en kiu Esperanta literaturo ludas gravegan rolon. La redakcio de Saluton! planas konatigi vin kun famaj E-poetoj kaj iliaj verkoj. Ne hezitu legi kaj memorigi parkere kelkajn el proponotaj poeziaj pecoj. Se vi tion ne faros, nia literaturo formortos kiel dinosaŭroj. Do, "Ho, mia kor'" de nia Majstro, unue aperigita en La Unua Libro:


Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'?
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!

# Varbado: Helpo por Disvolvi Esplor-reton

La usona esplorfondaĵo ESF serĉas part-tempan Akademian Kunordiganton kiu proksime kunlaboros kun estraranoj kaj stabanoj por disvolvi akademian komunumon kaj esplor-reton pri interlingvistiko, en Nord-Ameriko kaj alikontinente. La taskaro inkluzivas varbadon kaj korespondadon, la evoluigon de esploriloj (retpaĝoj, bibliografioj, k.s.), kaj konsiladon al la estraro pri promesplenaj iniciatoj kaj evoludirektoj. Bonega kono de la angla estas nepra; kapabloj en Esperanto estas tre dezirindaj, same kiel konoj pri unu aŭ pluraj aspektoj de interlingvistiko (ekz. lingvopolitiko kaj lingvoplanado, interkultura komunikado, transnaciaj sociologio kaj historiografio, kaj simiile. Ni volonte ricevas kandidatiĝojn de studentoj postdiplomaj, same de homoj kun postdiploma kvalifiko en parenca fako. Bonvenus pruvitaj spertoj pri esplorretoj je nacia aŭ internacia nivelo, same kiel konoj pri la planado kaj ellaboro de retejoj kaj datumbazoj. Horojn kaj rekompencon oni fiksos interkonsente kaj surbaze de kvalifikoj kaj spertoj. Por kandidatiĝi, bonvolu rigardi la plenan postenpriskribon ĉe http://esperantic.org/en/research/internship.

# Movadaj Novaĵoj



Unuafoje en pli ol cent jaroj, la revuo Esperanto havos sian redaktejon ekster Eŭropo. La brazilano Fabrício Valle estas elektita de la Estraro de UEA por transpreni la redaktoran postenon de Stano Marček, ekde la jarkolekto 2014. Jam en sia skriba sinprezento, Fabrício Valle montris grandan energion k kreemon, k krome tre realisman ideon pri la redaktora laboro. Li estis unu el ses kandidatoj por la posteno de redaktoro. Movadano ekde 1970, li okupis diversajn postenojn en la brazila Movado. La redaktoraj kapabloj de Valle estas videblaj en la ok numeroj de Brazila E-isto, kiujn li redaktis en la jaroj 2001-02. Por la revuo Esperanto Valle antaŭvidas proksiman kunlaboron kun talentuloj sur diversaj kampoj, cele al revuo kiu transformiĝos en aktivan engaĝilon. Sed la venonta redaktoro de la plej ĉefa revuo de UEA havas unu mankon – li dume ne estas membro de UEA (!?).

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Novembro – Elekta kunsido kaj Araneo raportos pri E-konferenco en Kolomeo, Ukrainio

15an de Decembro – Zamenhofa Tago kaj Bankedo 2013